

## MI ESTAS KREDANTO

Neil Diamond  
Esperantigo: Emanuele Rovere (Manŭel)

Kredis mi, ke amo estas nur fabel',  
neatingebla revo, kiel stel',  
afero iom stulta, malfidinda vort'.

Ĉu ŝanĝiĝos iam mia sort'?

Serĉis mi en preskaŭ ĉiu mondopart',  
enketis eĉ per divenista kart'.

Fariĝis mi skeptika, certa pli kaj pli,  
ke neniam trovos amon mi.

Sed nun mi vidas vin, vian vizaĝon,  
ricevas mia kor' tre belan mesaĝon.

Mi amas vin, fariĝas kredanto, kredanto je la amo.

Kredis mi, ka amo estas altruism',  
sed vidas mi, ke regas l'egoism'.

Ĉar mi donacis multon, sed mankis la eblec'  
por trovi iom da reciprokec'.

Kredis mi, ke amo estas fantazi',  
ekzistas por aliaj, ne por mi.

La amo, tiu vera, ne troviĝas plu,  
ĝis ĉi tiu kun vi rendevu.

Kaj, se rigardas mi vian vizaĝon,  
leviĝas tuj la sun' en mai ĉiel'.

Mi amas vin: mi estas kredanto, kredanto je la amo.